


LA JUNA VIVO

MONATA ORGANO
POR LA

JUNULARO KAJ
KOMENCANTOJ



Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.
Ĝironumero 209354 Nederlando.
Tel. 10

Jarabono:
Nederlando: 0.75 guldeno
Aliaj landoj: 1 guldeno
(1 gld. = 2,1 Sv. fr. aŭ 10 fr. fr.)

Por progresintoj

LA FELIĈA PRINCO. (Oscar Wilde).

Alte super la urbo, sur alta kolono, staris la statuo de la feliĉa princo. Li estis tute kovrita per maldika tavolo da bonega oro. Kiel okulojn li havis du brilantajn safirojn kaj en la tenilo de lia glavo brilegis ruĝa rubeno.

Oni multe admiris lin.

„Li estas tiom bela kiom la koko sur la turo”, diris iu; „tamen ne tiom utila”.

„Li aspektas kiel anĝelo”, diris knabineto.

„Kiel vi scias tion?” diris ŝia pliaĝa frato, kiu estis lerta en matematiko; „ĉu vi iam vidis iun?”

„Jes, mi vidis”, respondis la knabino, „en miaj songoj.”

Iun vesperon malgranda hirundo flugis trans la urbo. Ĝiaj amikoj jam antaŭ ses semajnoj foriris al Egiptujo, sed ĝi malfruiĝis, ĉar ĝi amikiĝis kun belega merlo.

„Ĉu vi volas fariĝi mia edzino?” demandis iun tagon la hirundo. „Sed atentu, mi ŝatas vojaĝadi, kaj mia edzino, konsekvence, devas konkordi kun mi”. La merlo tamen skuis la kapon; ĝi tro amis sian hejmlandon. Tiam la hirundo ekflugis al Egiptujo, ĉar ĝi sentis sin tre soleca, post kiam ĝiaj amikoj foriris.

La tutan tagon ĝi flugadis, kaj vespere alvenis en la urbo, kie ĝi sidiĝis inter la piedoj de la feliĉa princo. Ĝi volis tranokti tie, sed kiam ĝi metis la kapeton sub flugilon, granda akvero falis sur ĝin, kaj ree kaj denove falis akvero.

La hirundo rigardis supren kaj vidis — nu! kion ĝi vidis?

La okuloj de la feliĉa princo estis plenaj je larmoj, kaj larmoj fluis trans liajn orajn vangojn. Lia vizaĝo estis tiom bela en la lunlumo, ke la hirundeto kompatis lin.

„Kiu estas vi?” ĝi diris. — „Mi estas la feliĉa princo”, estis la respondo.

„Kial do vi ploras?” demandis la hirundo: „vi tute malsekigis min”.

„Kiam mi ankoraŭ vivis, kaj havis homan koron”, respondis la statuo „mi ne konis larmojn. Ĉar mi vivadis en belega palaco, kien malĝojo neniam eniris kaj mi havis kion mi nur povus deziri. Tage mi ludadis en la ĝardeno, kaj vespere mi dancis en la granda halo. Ĉirkaŭ la ĝardeno estis alta muro, sed mi neniam demandis, kio estas trans la muro, ĉio ĉirkaŭ mi estis ja belega.

Miaj korteganoj nomis min „la feliĉa princo” kaj feliĉa mi estis; tia mi vivadis kaj tia mi mortis”.

La hirundo tre miris, kiam ĝi aŭdis la paroladon de la statuo, sed post iom da tempo kutimiĝis al tio.

„Post mia morto”, daŭrigis la statuo, „oni metis min ĉiloke, tiom alte, ke mi povas vidi la mizeron de la tuta urbo mia.

Kaj kvankam mia koro estas el plumbo, mi ne povas ne plori vidante tiun mizeron. Malproksime, en strateto loĝas malriĉa familio. Pala kaj laca virino sidas ĉe la tablo, brodanta, ĉar ŝi estas brodistino. En lito en angulo de la ĉambro kuŝas ŝia malgranda filo, malsana; febro kaptis lin kaj li petas oranĝon.

Lia patrino havas nenion por doni al li ol riverakvon, tial ŝi ploras. Hirundo, hirundo, malgranda hirundo, ĉu vi volas alporti al ŝi la rubenon el la tenilo de mia glavo?”

„Oni atendas min en Egiptujo”, diris la hirundo. „Mi jam estas malfrua, kaj jam plimalvarmiĝadas”.

„Hirundo, hirundo, malgranda hirundo”, diris la princo, „ĉu vi ne volas resti kun mi unu nokton kaj esti mia helpanto La knabo estas tiom soifa kaj la patrino tiom malĝoja”.

„Mi ne kredas, ke mi amas knabojn”, respondis la hirundo. „La lastan someron, kiam mi flugis super la rivero, la knaboj ĵetis ŝtonojn al mi”.

Sed la feliĉa princo aspektis tiom malĝaje, ke la hirundeto ek-sentis kompaton.

„Estas tre malvarme tie ĉi”, ĝi diris: „tamen mi volas resti kun vi unu nokton kaj esti via helpanto.”

„Dankon, malgranda hirundo”, diris la princo.

Tiam la hirundo elpikis el la glavotenilo de la princo la grandan rubenon, kaj forflugis kun ĝi, trans la tegmentojn de la urbo.

Ĝi flugis trans la turon de la katedralo kun skulptitaj anĝeloj. Ĝi transpasis la palacon kaj aŭdis la sonojn de muziko kaj danado. Belega knabino venis sur la balkonon kun sia amanto.

„Mi esperas, ke mia surbrodita jupo estos preta antaŭ la granda balo; sed brodistinoj estas tiom maldiligentaj,” ĝi aŭdis ŝin diri.

Fine ĝi alvenis al la malriĉa domo kaj rigardis internen. La knabo kuŝis en sia lito, suferanta pro febro kaj la patrino endormiĝis, ŝi estis tiom laca. Ĝi saltetis en la ĉambron kaj metis la grandan rubenon sur la tablon apud la fingringo de la virino. Post tio ĝi flugetis ĉirkaŭ la lito, ventumante per siaj flugiletoj la frunton de la knabo.

„Kiom freŝa mi sentas min”, diris la knabo. „Mi certe resaniĝas”, kaj dolĉe li endormiĝis. Tiam la hirundo flugis returne al la feliĉa princo kaj rakontis al li, kion ĝi faris.

„Estas kurioze”, ĝi rimarkis, „nun mi sentas min tute varma, kvankam estas tre malvarme.”

„Tion kaŭzis via bona faro”, diris la princo. Kaj pensante pri tio la hirundo endormiĝis. Pensado ĉiam faris ĝin dormema.

„Hodiaŭ mi foriros”, diris la hirundo la alian tagon; „ĉu vi havas ian komision por Egiptujo?”

„Hirundo, hirundo, malgranda hirundo”, diris la princo, „ĉu vi ne povas resti unu tagon plilonge?”

„Oni atendas min en Egiptujo”, respondis la hirundo; „fariĝas jam plimalvarme. Mi timas, ke mi ne povos elteni la klimaton tie ĉi”.

„Hirundeto”, diris la princo, „malproksime, trans la urbo, mi vidas junan viron, en mansardo. Li kliniĝas super tablo, kovrita de paperoj kaj en vazo, apud li, estas bukedo el velkiĝintaj violoj. Liaj haroj estas brunaj kaj belaj kaj li havas grandajn revantajn okulojn.

Li klopodas fini teatraĵon por la direktoro de iu teatro, sed pro malvarmo kaj malsato li ne povas daŭrigi sian laboron”.

„Mi restos kun vi ankoraŭ unu nokton”, diris la hirundo, kiu fakte havis bonan koron; „ĉu mi alportos al li alian rubenon?”

„Ho ve! Mi ne havas alian rubenon”, diris la princo: „Nur miaj

okuloj restis al mi. Ili estas el maloftaj safiroj, kiujn oni alportis el Hindujo, antaŭ mil jaroj.

Elpiku unu el ili kaj donu ĝin al la verkisto: li vendos ĝin ĉe la juvelisto kaj aĉetos panon kaj brulaĵon kaj finos sian verkon”.

„Kara princo”, diris la hirundo, „mi ne povas fari tion”, kaj ĝi komencis plori.

„Hirundo, hirundo, malgranda hirundo”, diris la princo, „faru kion mi ordonis al vi.”

Tiam la hirundo elpikis unu el la okuloj de la princo kaj forflugis kun ĝi al la mansardo de la artisto.

Ne estis malfacile eniri, ĉar en la tegmento estis truo, tra kiu ĝi eniris la ĉambreton. La juna viro ne aŭdis ĝian flugetadon kaj kiam li ĵetis rigardon sur la violojn, li trovis la belegan safiron, kiun la hirundo metis tien.

„La homoj komencas ŝati min”, li ekkriis: „ĉi tio estas de iu admiranto; nun mi povas fini mian laboron”, kaj li estis kontenta. Kiam la luno leviĝis, la hirundo flugis returne al la princo: „Mi venis por adiaŭi vin”, ĝi diris.

„Hirundo mia”, diris la princo, „ĉu vi ne volas resti kun mi ankoraŭ unu tagon?”

„Estas nun vintro”, respondis la hirundo, „kaj baldaŭ neĝos tie ĉi; en Egiptujo nun estas sunbrilo kaj verdaj palmarboj.

— Kara princo, mi devas forlasi vin kaj la sekvontan printempon mi alportos por vi du belajn juvelojn por anstataŭi tiujn, kiujn vi fordonis”.

„Sur la placo malsupre”, diris la feliĉa princo, „staras malgranda knabino, kiu vendas alumetojn, en la pluvo.

La alumetoj falis el ŝiaj manoj kaj nun ili malboniĝis.

La patro certe ŝin batos, se ŝi ne alportos monon hejmen kaj tial ŝi ploras. Elpiku mian duan okulon kaj donu ĝin al la knabino, por ke la patro ne batu ŝin.”

„Mi restos kun vi plian nokton”, diris la hirundo, „tamen mi ne povas elpiki vian okulon; tiam vi estus tute blinda”.

„Hirundeto”, diris la princo, „faru kion mi ordonis al vi”.

La hirundo faligis la juvelon ĝuste en la manon de la vendistino.

„Kia bela vitra koralo”, ŝi ekkriis; kaj ridanta ŝi kuregis hejmen.

La hirundo reiris al la princo. „Nun vi estas tute blinda”, ĝi diris, „tial mi restos kun vi, ĉiam”.

„Ne, hirundeto”, diris la malfeliĉa princo, „nun vi devas foriri al Egiptujo”.

„Mi volas ĉiam resti kun vi”, diris la hirundeto kaj ĝi sidiĝis ĉe la piedoj de l'princo por dormi. La sekvintan tagon ĝi sidis sur la ŝultro de la princo kaj rakontadis al li pri tio, kion ĝi vidis en fremdaj landoj. Ĝi rakontis pri la ruĝaj ibisoj, kiuj staras ĉe la bordoj de la rivero Nilo, kie ili kaptas orfiŝojn per siaj bekoj.

Ĝi rakontis al li pri la sinkso, kiu estas tiom maljuna kiom la tero mem kaj kiu vivadas en la dezerto kaj scias ĉion. Ĝi rakontis al li pri la negocistoj, kiuj malrapide iras flanke de siaj kameloj kaj pri multaj aliaj belegaj aferoj.

„Kara hirundeto”, diris la princo, „vi rakontas al mi pri mirindaĵoj, tamen pli mirinda ol ĉio estas la suferado de viroj kaj virinoj. Flugu super mia urbo, malgranda hirundo, kaj rakontu al mi, kion vi vidos tie”.

Tiam la hirundo flugis super la urbego. Ĝi vidis la riĉulojn en iliaj belegaj domoj kaj la almozpetulojn ĉe la pordegoj. Ĝi flugis en mallumaj kvartaloj kaj vidis la palajn vizaĝojn de malriĉaj infanoj en la mallumaj stratetaĉoj. Poste ĝi reflugis al la princo kaj rakontis al li, kion ĝi vidis.

„Mi estas tute kovrita per bonega oro”, diris la princo: „vi devas forpiki ĝin, folion post folio kaj doni ĝin al miaj malriĉuloj: vivantoj ĉiam opinias, ke oro povas feliĉigi iun.”

Folion post folio de la bonega oro la hirundo forpikis, ĝis kiam la princo aspektis tute griza kaj senbrila.

Folion post folio ĝi portis la oron al la malriĉuloj. La vizaĝoj de la infanoj ruĝiĝis kaj ili ludis en la stratoj.

„Nun ni havas panon!” ili kriis.

Tiam venis la neĝo kaj frosto; longaj kegloj el glacio pendis de la tegmentoj de la domoj kaj sur la glacio glitveturis homoj.

La malfeliĉa hirundo pli kaj pli malvarmiĝis, tamen ĝi ne volis forlasi la princon; ĝi amis lin tro multe.

Ĝi forpikis kelkajn panerojn antaŭ la pordo de bakejo kaj klopodis forigi la malvarmon frapetante per siaj flugiloj.

Sed fine ĝi sentis alproksimiĝi la morton. Ĝi apenaŭ havis la forton por flugi ankoraŭ unu fojon sur la ŝultro de la princo.

„Adiaŭ, kara princo”, ĝi murmuris; „ĉu vi permesas al mi kisi vian manon?”

„Mi ĝojas, ke vi fine foriros al Egiptujo, hirundeto”, diris la

princo; „vi restis tro longe tie ĉi; tamen vi devas kisi min sur la lipoj, ĉar mi amas vin”.

„Ne estas al Egiptujo, ke mi iros”, diris la hirundo. „Mi nun iros al la regno de la morto”.

Kaj kisinte la princon sur la lipoj, ĝi falis morta je liaj piedoj. En tiu momento stranga krako aŭdiĝis interne de la statuo, kvazaŭ io dispeciĝis.

La koro de la princo rompiĝis

Harlemo (Ned.)

Trad. PIKILO.

BIRDOJ EN NIAJ ĜARDENOJ.

En mian ĝardenon venas ankaŭ pli grandaj birdoj: sturnoj, turdoj, kornikoj ktp. La sturnoj ĉiam estas tre nervaj, ili rapidas kiom eble plej multe, prenas grandajn pecojn kaj tuj forflugas. Se vintre estas tre malvarme, mi ofte donas varmetan nutraĵon: kuiritan rizon, avenkaĉon, griaĵon ktp. Estas rimarkinde, kiom baldaŭ la sturnoj scias, ke tia frandaĵo estas en la ĝardeno. Ili venas tiam multope kaj formanĝas la tutan provizon el la plado. Ankaŭ se mi donas pelvon da varmeta akvo, ili venas grandnombre, krias, batalas, forpuŝas unu la alian kaj faras grandan tumulton: ĉiu volas trinki. Per larĝe malfermita beko ili ĉerpas la varmetan akvon el la ujo kaj englutas ĝin, tenante la kapon malantaŭe.

Iun someran tagon en Julio, kiam la sturnoj jam havis sian duan idaron, mi ĵetis kelkajn tro maturajn, iom putrajn ĉerizojn en la ĝardenon. Subite multaj sturnoj venis kun siaj idoj. La gepatroj prenis ĉerizon, batis ĝin sur la teron ĝis la ŝelo krevis, forĵetis la kernon kaj dispecigis la frukton. Ĉiu ido ricevis nur malgrandan pecon kaj ŝajnis, ke ili tre ŝatas ĉerizojn. Unu el la idoj estis tiel malpacienca, ke ĝi ne volis atendi. Ĝi mem prenis tutan ĉerizon en la bekon, sed ne povis engluti ĝin. La patro-sturno tuj vidis tion; ĝi provis eltiri la frukton el la beko de la manĝegema ido, sed ĉi tiu fikse tenis ĝin, kaj la sturno havis grandan penon por sukcesi.

Nederlando, Wassenaar.

A. E. S. MICHELSEN,


El miaj propraj spertoj.

ATENTU!

Ĉiu, kiu varbas 5 novajn abonantojn je nia revuo, ricevos donace „La Unuan Jarkolekton de „La Juna Vivo”. Do multvaloran libron de proksimume 200 paĝoj.

VEKIGU


*(Ĉenkanto por 3 Voĉoj)



1. Ve - ki - ĝu do, dor - man - toj! Jam vo - kas la ku -
 2. Ek - so - nas ĉi - e kan - toj, Mal - fer - mas sin ko -



1. kol'! } Ve - ki - ĝu, ve - ki - ĝu, Jam vo - kas la ku -
 2. rol'! }



kol': Ku - kuk ku - kuk ku - kuk ku - kuk.

Antverpeno (Belg).

trad. J. VAN SCHOOR.

*) (Ĉenkanto = canon).

Aldono al la kanto: La literoj G, D, C, k.t.p. indikas la akordojn, kiujn oni ludu (gitaro aŭ liuto) akompane al la sube starantaj notoj. (G = G, B, D, G; C = C, E, G, C; k.t.p.)

LUDO (Ekzercludo).

Ĉiu el la rondo prenas paperon kaj kraĵonon. Oni fiksas prefikson aŭ sufikson, per kiu oni rapide faru multajn vortojn. Post 5—10 minutoj ĉiuj samtempe ĉesas la skribadon; tiam sekvas laŭtlegado de la faritaj vortoj.


Ĉar komikaj vorteltrovoj estos inter la multaj, la bona humoro kreiĝos tiel. Samtempe ĝi estas bona ekzerco, ĉar oni aŭdas multajn vortojn en mallonga tempo.

Se eksterlandanoj grupe abonas la gazeton, ili pagas nur la nederlandan abonprezon.



ZULKE PLAAGGEESTEN.

WEER DIEZELFDE RAKKERS.



HIER WONEN JAN EN HEIN JANSEN.

SUBSKRIBOJ DE LA BILDOJ.

1. „Kiaj incituloj!”
2. „Ĉiam la samaj netaŭguloj!”
3. „Ĉi tie loĝas Johano kaj Hendriko Jansen.”

Rakontu la enhavon kaj sendu la verkaĵojn al Red. „La Juna Vivo”. Estas tre bona ekzerco rakonti laŭ la bildoj en la grupkunvenoj! **Inter la sendintoj de la plej bonaj verkaĵoj ni disdonos 3 premiojn. Sendu viajn verkaĵojn antaŭ 1 Aprilo.**

El; T. v. d. Brink en Th. Lancée. „Onze eigen taal”, J. B. Wolters, Groningen-den Haag-Batavia.

ENIGMOJ (ŝaradoj).

I. Unua parto estas prepozicio; 2a parto estas ludilo, kiun oni turnsvingas sur la grundo; la tutaĵo estas malordo en homa korpo aŭ maŝino.

II. Unua parto estas sufikso, kiu signifas elementon de tutaĵo; 2a parto estas fabela rakonto pri antikvaj dioj; la tutaĵo estas piulo, vivanta en soleco.

III. Unua parto estas prepozicio, kiu montras proksimecon; 2a parto estas intermonta vastaĵo; la tutaĵo estas dombesto.

Soissons (Franc.)

J. BOURNICHE.

Inter la ĝustaj solvintoj ni dislotos 3 premiojn; ni akceptos solvojn ĝis la unua de Aprilo!

Sendu la solvojn rekte al la redakcio, ne al la diversaj perantoj, ĉar ili ne bezonas transsendi ilin!!

La solvo el No. 6 estas: Kastelo — idaro — ulno — najlo — etaĝo — regolo — idealo — sanatorio — klubo — abio — satiro. La proverbo estas: Kiu ne riskas, tiu ne gajnas.

La gajnintoj estas: F.ino Chauveau, Chateauroux, Francujo; S.ro A. R. Overbeek, Amsterdamo, Nederlando; S.ro Ficker, Lössnitz, Aŭstrujo; S.ro Viskajno, Valencia, Hispanujo.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO.

Antaŭ kelkaj semajnoj ni enskribis la 100an abonanton en Anglujo. Kiel surprizon ni sendis la binditan jarkolekton kaj 8 ekz. de la teatraĵo „La novaj vestoj de la reĝo”. La feliĉulino estis F.ino Nixon, kiu abonigis 34 ler-nantojn.

En Francujo ni jam en Julio notis la 100an. — Nun verŝajne sekvos Sve-dujo, mankas nur kelkaj!

La grupoj en jenaj lokoj enkondukis „La Juna Vivo”:

Anglujo: Bourneville, Birmingham (infankurso); Edgware, Middlesex.

Aŭstrio: Strasswalchen.

Finlando: Kouwola.

Francujo: Orléans.

Nederlando: Amsterdamo (grupo da plenaĝuloj); Drachten; Heerenveen; den Haag (plenaĝuloj); Rotterdam (plenaĝuloj); St. Annaparochie.

Oni povas aboni „La Juna Vivo” ekde Julio kaj ekde Januaro.

KORESPONDADO.

B. en S. (Franc.), C. en B. (Belg), N. en A. (Ned.): Viaj rakontoj estas tro konataj. — B. en S. (Franc.): Viaj enigmoj grandparte aperos en „L.J.V.” (minuet = menuet). — G. K. en D. (Germ.): La enhavo de viaj artikoloj estas tro dolĉa. — E.R-S. en B. (Belg.): Via kanto ne taŭgas por plenaĝuloj. — A. T. en B. (Ĉeh.): Mi vere ne povas legi viajn kantojn, Provizore mi havas sufiĉe da muzikaĵoj. N. en B. (Ned.): Estas en ordo.

DAŬRIGA KURSO.

A. Ruza Ekpenso.

Okaze de edziĝ-festo sidis multaj gastoj ĉe longa tablo. Unu el ili, kiu ege ŝatis fiŝon, vidis antaŭ si nur pladon kun etaj fiŝoj. Li tamen deziris manĝi la grandajn, kiuj troviĝis sur plado malproksime de li. Kiel akiri unu! Ne decus, peti ilin. Subite li havis ekpenson. Per **sia** forko li prenis malgrandan fiŝon kaj tenis ĝin ĉe la dekstra orelo. Poste ĉe la maldekstra. Li mienis, kvazaŭ li atente aŭskultas. Liaj amikoj mire rigardis lin, kaj fine demandis, kion li faras. Li **melankolie** respondis: „Mi havis amikon, kiu dronis antaŭ du jaroj, kaj nun mi demandas al la fiŝeto, ĉu ĝi scias ion pri mia amiko.”

„Kaj kion ĝi respondas?”

„Ĝi respondas, ke ĝi ankoraŭ ne vivis, kiam okazis la akcidento. Sed la grandaj fiŝoj, kuŝantaj sur la alia plado, certe povos informi min, ĝi diras.”

Liaj amikoj ridis kaj transdonis al li la pladon kun la grandaj fiŝoj.

Francujo, Parizo.

LECHELLE.

B. Li pagas la libron de amiko — li pagas **lian** libron.

Li pagas la libron de si mem — li pagas **sian** libron.

Ŝi kaptas la ĉapelon de amikino — ŝi kaptas **ŝian** ĉapelon.

Ŝi kaptas ĉapelon de si mem — ŝi kaptas **sian** ĉapelon.

Ili vidis la domon de miaj gepatroj — ili vidis **ilian** domon.

Ili vidis la domon de si mem — ili vidis **sian** domon.

I. Lernu bone la novajn vortojn en A, kaj B.

II. Traduku A kaj B en vian gepatran lingvon.

III. Legu kelkfoje la rakonton „Ruza ekpenso”, kaj rakontu la enhavon.

IV. Respondu al jenaj demandoj:

Kial ĉeestis tiom multaj gastoj? Kiaj fiŝoj estis sur la tablo? Kial la fiŝamanto ne povis akiri la grandajn fiŝojn? Kiun ruzon li elpensis? Ĉu li havis sukceson?

A. LA FORGESEMA PROFESORO.

Foje profesoro X fervore studis, kiam la servistino frapis la pordon kaj diris: „Profesoro, via manĝaĵo estas preta.”

„Bone, mi venos,” estis la respondo.

Iom poste la servistino ree frapis kaj parolis:

„Profesoro, estas sinjoro por paroli kun vi. Mi kondukis lin en la manĝo-ĉambro, ĉar la atendejon oni **farbas.**”

„Bone,” respondis la **scienculo**, „diru al li, ke mi tuj venos.”
Tiam li daŭrigis la studadon.

Intertempe la vizitanto **pacience** atendis. Li faris longan vojaĝon kaj ege malsatis. Li singarde levis la kovrilon de unu el la pladoj. „**Rostita kokido!!** Ha, kiom bonguste ĝi **aspektas!**” Li **ne povis ne gustumi** peceton. Kiom delikata ĝi estis! Li ne povis regi sin kaj baldaŭ apetite manĝis. Ankaŭ de la aliaj manĝaĵoj li prenis grandan **porcion**. Kiam li estis sata li orde kovris la pladojn.

„He”, li pensis, „tamen estas iom **impertinente** de mi; sed mi ege malsatis kaj la profesoro ŝajne ne havas apetiton.”

Ĉi tiu fine ekstaris de sia studotablo kaj memoris, ke li ankoraŭ devas manĝi. En la manĝo-ĉambro li trovis la atendantan sinjoron. La profesoro senkulpigis sin, ĉar li tiom longe atendigis la vizitanton. Post la interparolo li diris: „Mi tiom longe lasis vin sola, kaj vi faris longan vojaĝon. Faru al mi la plezuron kaj manĝu kun mi: Certe estas sufiĉe por ni ambaŭ.”

Li levis la kovrilon de unu el la pladoj kaj vidis nur **ostojn**.

„Ah, kara sinjoro”, li parolis, „**pardonu** al mi. Mi estas iom forgesema hodiaŭ. Mi vidas, ke mi jam manĝis.”

B. Mis-kompreni, misuzi, miskalkuli, **miskonduti**, mispaŝi, misrigardi, misformi, misaŭdi, misvidi, **misprononci**, **misapliki**; miskompreno, misuzo, miskalkulo, mispaŝo.

C. Traduku: Plej granda potenco kuŝas en la komenco. — Mano manon lavas. — **Ĉerpi** akvon per **kribrilo**. — Ĉiu havas sian propran guston. — Kio pasis, ne revenos.

D. Uzu en frazoj: Ŝati — **estimi**, ordoni — **komandi**, trankvila — kvietaj, peni — klopodi, **sonĝi** — **revi**, migri — vagi, gaja — ĝoja, **esplori** — ekzameni, aŭdi — aŭskulti, **prepari** — **arangĝi**, peti — demandi, vidi — rigardi.


I. Lerne bone la novajn vortojn en A, B, C, D.

II. Traduku A, B, C, D, en vian gepatran lingvon.

III. Rakontu la enhavon de „La forgesema profesoro.”

IV. Respondu al jenaj demandoj;

Kion sciigis la servistino al profesoro X? Ĉu la profesoro tuj iris por manĝi? Kial la servistino venis duan fojon? Kio okazis en la manĝo-ĉambro? Kiel la vizitanto senkulpigis sin? Kial la profesoro fine iris al la manĝo-ĉambro? Kion li petis al la vizitanto? Kial la profesoro pensis, ke li jam manĝis?



LA TRIA LECIONO.

- | | | |
|---------------|--------------|----------------|
| 1. spegulo | 11. stango | 21. seĝeto |
| 2. lav-tablo | 12. pilko | 22. tableto |
| 3. lav-kuvo | 13. arlekeno | 23. pilketo |
| 4. sapo | 14. birdo | 24. kuboj |
| 5. krano | 15. turbo | 25. piedoj |
| 6. lav-tuko | 16. ĉevalo | 26. infan-lito |
| 7. spongo | 17. skatolo | 27. pup-lito |
| 8. dent-broso | 18. burĝonoj | 28. pupo |
| 9. dent-pasto | 19. bulboj | 29. vestoj |
| 10. kombilo | 20. seĝo | 30. ŝuoj |

bela floro — belaj floroj; ronda pilko — rondaj pilkoj; dika libro — dikaj libroj; interesa libro — interesaj libroj.

A. Moderna Dormĉambro.

1. En la ĉambro estas lav-tablo, ŝranko, tableto, seĝoj, infanlito kaj aliaj objektoj. 2. La tableto estas **kvadrata**. 3. **Ĉe** la tableto staras **mal-granda** seĝo (seĝeto). 4. Sur la tablo estas kvar kuboj kaj mal-granda pilko (pilketo). 5. La **koloro** de la tableto kaj seĝoj estas **bruna**. 6. **Kontraŭ** la muro staras ŝranko kaj **blanka** lav-tablo. 7. La ŝranko estas **mal-alta**. 8. Sur la ŝranko staras plado kaj vazo. 9. En la vazo estas **belaj** burĝonoj. 10. En la plado estas du bulboj.

11. En la ŝranko estas arlekeno, pilko, turbo, ĉevalo, birdo, du skatoloj kaj kvar libroj. 12. En la **dikaj** libroj estas **multaj folioj**. 13. La koloro de la libro-folioj estas **blanka**. 14. La folioj de la plantoj estas **verdaj**. 15. La pilko estas **ronda** kaj la arlekeno estas **komika**. 16. Sur la **granda** seĝo **kuŝas** la vestoj de infano. 17. La infano **dormas** en la infan-lito. 18. La **nomo** de la infano estas **Manjo**. 19. Manjo estas **ĉarma knabino**. 20. Ankaŭ la **fidela kama- rado**, la granda pupo, kuŝas en la lito.

B. Kia estas la ĉambro?	La ĉambro estas moderna.
Kia estas la tableto?	La tableto estas kvadrata.
Kia estas la pilko?	La pilko estas ronda.
Kia estas la lav-tablo?	La lav-tablo estas blanka.
Kie estas la libroj ?	La libroj estas en la ŝranko .
Kio estas vazo?	Vazo estas objekto .
Kia estas arlekeno?	Arlekeno estas komika .
Kie estas la kubo?	La kubo estas sur la tablo .
Kio estas la ŝranko?	La ŝranko estas meblo .

- Lernu bone la novajn vortojn.
- Kopiu la frazojn en vian kajeron.
- Traduku la lecionon en vian gepatran lingvon.
- Respondu al jenaj demandoj:

1. Kio estas en la ĉambro? 2. Kie staras la seĝeto? 3. Kio estas sur la tableto? 4. Kia estas la koloro de la tableto kaj seĝoj? 5. Kie staras la ŝranko? 6. Kia estas la ŝranko? 7. Kio staras sur la ŝranko? 8. Kie estas la belaj burĝonoj? 9. Kie estas la bulboj? 10. Kio estas en la ŝranko? 11. Kia estas la koloro de la libro-folioj? 12. Kia estas la folioj de la planto? 13. Kie kuŝas la vestoj de la infano? 14. Kie dormas la infano? 15. Kia estas Manjo?

(En la komenco de ĉiu leciono la instruisto ripetu la antaŭajn lecionojn).

LA KVARA LECIONO.

31. lud-arboj	38. anaso	47. angulo	5 = kvin
32. domo	39. akvo	48. kruro	6 = ses
33. preĝejo	40. ondo	1 = unu	7 = sep
34. tegmento	42. ŝnuro	2 = du	8 = ok
35. pordo	43. najlo	3 = tri	9 = naŭ
36. ansero	44. kuniklo	4 = kvar	10 = dek
37. fungo	45. ĉareto		

Granda pilko — malgranda pilko. Alta ŝranko — malalta ŝranko. Longa kruro — mallonga kruro. Dikaj libroj — maldikaj libroj.

A. 1. Kontraŭ la muro staras la lav-tablo. 2. Sur najlo pendas **blanka**, granda lav-tuko kun **blua strio**. 3. Sur la stango pendas malgranda tuko (tuketo). 4. **Tie** estas ankaŭ **flava** spongo. 5. Dentbroso, dentpasto, kombilo kaj glaso staras sur la **vitra plato**. 6. Estas ankaŭ krano kaj sapo. 7. La lav-tablo estas **kompleta**. 8. Ĉe la infanlito staras seĝo. 9. **Sub** la seĝo estas la ŝuoj de Manjo. 10. Tie estas ankaŭ la puplito. 11. La **paperaj** dometoj, la tri arbetoj, la kvar kuboĵoj, kaj la du pilkoj **apartenas al** Manjo. **Ili** estas **ludiloj**. 12. La ŝranko, la lavtablo kaj la libroj apartenas al la **patro** kaj la **patrino** de Manjo. 13. La ŝranko, la lavtablo kaj la libroj apartenas al la **patro** kaj la **patrino** de Manjo. 14. Sur la muro pendas **belaj** bildoj. 15. Kuniklo en ĉareto, anseroĵoj, anasoĵoj, fungoĵoj kaj aliaj **figuroj** estas sur la bildoj. 16. La anasoĵoj **dancas** sur la ondoĵoj. 17. La kruroĵoj de la anseroĵoj estas mallongaj. 18. La kruroĵoj de la granda pupo estas longaj. 19. Anaso, ansero, kuniklo, muso kaj kato estas malgrandaj bestoj. 20. Leono, tigo, ĉevalo, kaj bovo estas grandaj bestoj. 21. Kato, bovo kaj ĉevalo estas dombestoj. 22. Leono kaj tigo estas **sovaĝaj** bestoj.

B. La pupo estas en la ĉambro.
Manjo dormas en la lito.
La kuboĵoj estas sur la tablo.
Ĉu Manjo estas en la lito?
Ĉu la bildo pendas sur la muro?
Ĉu la pilko estas en la ŝranko?
Ĉu Manjo estas en la glaso?
Ĉu la kato estas sur la tablo?
Ĉu la muso estas granda?

Ĉu la pupo estas en la ĉambro?
Ĉu Manjo dormas en la lito?
Ĉu la kuboĵoj estas sur la tablo?
Jes, Manjo estas en la lito.
Jes, la bildo pendas sur la muro.
Jes, la pilko estas en la ŝranko.
Ne, Manjo **ne** estas en la glaso.
Ne, la kato **ne** estas sur la tablo.
Ne, la muso **ne** estas granda.

C. 1. Kio estas lav-tablo? 2. Kia estas la lav-tablo? 3. Kie estas la lavtuko? 4. Ĉu la lavtuko estas sur la tablo? 5. Kie pendas la tuketo? 6. Ĉu la spongo estas en la lito? 7. Kio staras sur la vitra plato? 8. Ĉu estas ankaŭ krano kaj spongo? 9. Ĉu la lav-tablo estas kompleta? 10. Kie staras seĝo? 11. Kio estas sub la seĝo? 12. Kio apartenas al Manjo? 13. Kio apartenas al la patro kaj patrino? 14. Kie pendas belaj bildoj? 15. Kio estas sur la bildoj? 16. Kie dancas la anasoĵoj? 17. **Kiaj** estas la kruroĵoj de la pupo? 18. Kio estas kato, bovo kaj ĉevalo? 19. Ĉu anaso, ansero kaj kuniklo estas grandaj bestoj?

KORESPONDADRESOJ

Al niaj abonantoj: Ĉiu abonanto aŭ grupo havas la rajton enpresigi unufoje en la jaro senpagan korespondadreson.

Ĉeĥoslovakujo: Mi deziras korespondi kun gesamideanoj precipe el Japanujo, Sovetio kaj Ĉinujo. Certan respondon. Adreso: K.do Karel Sargánek, Poruba u Orlové No. 194, Têš.-Slezsko.

Italujo: Mi deziras korespondi kun samideanoj en ĉiuj landoj. Adreso: Pacini Oddino, Via Filippo Corridoni No. 17 — Pisa.

Nederlando: 12 geknaboj (10—12 jaraj) deziras interŝanĝi poŝtk. il. Adreso: D. v. Dyk, Hensbroekerstr. 8, Nieuwendam, A'dam N.

Nederlando: 12-jara knabo deziras interŝanĝi poŝtmarkojn. Ĉiu, kiu sendas al li 50 ekz. li rekompence sendos 50 aliajn ekz. Adreso: W. v. Veenendaal, West-Graffdyk (N.H.).

Nederlando: Grupeto da korespondemuloj deziras viglan korespondadon. Adreso: K. Stam, Zandweg 119, Wormer.

Nederlando W. v. d. Hoff (13-jara knabo) deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Adreso: West-Graffdyk (N.H.).

Nederlando: Esp. kurso en Schagen organizos en Marto letervesperon. Bonvolu sendi multajn leterojn al: F.ino M. de Wit, Roosstr. 116, Schagen.

Nederlando: S.ro H. Hubers, Boompjes 28 (achter), Almelo, dez. interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtk. il. kun ĉiuj landoj. Kiu sendas 50 aŭ 100 p. m. de sia lando tuj ricevos de mi la saman kvanton (ne Francujo).

Nederlando: Laborista Grupo dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Skribu multnombre al: „Certe ni venkos”, adr. W. Braakensiek, Asterstr. 19, den Helder. Certa respondo.

Nederlando: S.ino v. Vlaardingen petas korespondadresojn por siaj gelernantoj (12—15 jaraj). Adreso: S.ino v. Vlaardingen, Schiedamse weg 4 D, Rotterdam W.

Nederlando: 50 komencantoj (laboristoj) dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Skribu multnombre al: G. Vos, Molenaarstr. 186, Hago (den Haag).

Svedujo: 13 jara knabino dez. korespondi kun geamikoj el ĉiuj landoj por interŝanĝi poŝtm. kaj poŝtk. Respondo certa. Adreso: Anna-Britta Andersson, Vanadislundén 2 B. I tr., Stokholm.

Hispanujo: Mi volonte interŝanĝos poŝtk. il, desegnaĵojn ktp. Adreso: Salvador Frapé Jubenteny, Strato Cerdena, 280, Barcelona.

Portugalujo: Esperantista Grupo „Norda Stelo” — S. Maritimo da Gelfa-Minho-Portugalio, dez. korespondi. Certa respondos.

Danujo: Rikardo Kristensen, Norgesgade 8, Aalborg, dez. kor: kun gesamideanoj el tutmondo. Respondo certa.

Danujo: Bernhard Svendsen, Norgesgade 8, Aalborg, dez. kor. kun gesamideanoj el tutmondo. Respondo certa.

Nederlando: S.ino W. E. Polderman, Wagenaarstr. D 93, Middelburg, dez. kor., ĉefe poŝtkarte.

Svedujo: 70 gekursanoj aranĝos letervesperon en la fino de Februaro. Nepra respondo. Sendu al: Herbert Levi, Esperanto-hejmo, Jonköping.

Latvujo: Instruita terkulturisto, 30-jara fraŭlo, dez. kor. kun gesamideanoj el tuta mondo. Respondo certa! Adr.: S.ro A. Asars, Zeltini, „Lielpaldi”.

Nederlando: Gekomencantoj (12—40 jaraj) dez. kor. kun ĉiuj landoj. Certa respondo. Jac. Vonk, Hanepad 48, Zaandam.

Danujo: S.ro Alfred Weiss, Priorgade 15, St. Aalborg, S.ro L. Larsson, Reberbangade 35 St. Aalborg, kaj S.ro S. Gunvval, Instruisto, Prinsengade — Grønnegaard C, Aalborg, dez. kor. kun ĉiuj landoj. Respondo Certa!

GRAVA PREZMALALTIGO!			Szilágyi-Centhon: La	
Aĉetebraj ĉe la red. de „La Juna Vivo”:			pentro-arto en la	
	BINDITA		Malnova Hung	7,75 4,05
	mal-	nova	Szilágyi: Trans la Fabe-	
	prezo	nova	loce ano	2,50 1,35
	(en guld.)		Totsche: De Paĝo al	
Baghy: Viktimoj	3,10	1,65	paĝo	2,00 1,20
„ : Dancu Marionetoj	2,70	0,85	Totsche: Dekdu Poetoj	2,00 1,25
„ : Hura	4,65	3,45	Engholm: Homoj sur la	
„ : Preter la Vivo ...	1,65	1,10	tero	2,50 1,45
„ : Pilgrimo	1,65	1,05	Engholm: Infanoj en	
Kalocsay: Lingvo Stilo			Torento	1,75 0,90
Formo	2,25	0,95	Weinhengst:	
„ : Streĉita Kordo	2,85	1,60	Tur Ŝtrato 4	2,25 1,45
„ : Rimportretoj	2,25	0,65	Aldonu 10 % por sendkosto.	
„ : Eterna Bukedo	5,10	3,00		
Kalocsay-Madách: Tragedio de l'Homo	3,00	1,50		
Kalocsay-Dante: Infero	5,50	2,85		
Kalocsay-Hekler: Arthistorio	7,50	3,40		
Kalocsay-Hekler: Arthistorio II	6,00	3,95		
Kalocsay-Mussolini: Vivo de Arnaldo	1,65	0,95		
Kalocsay-Waringhien: Parnasa Gvidlibro	2,50	1,35		
Kalocsay-Waringhien: Plena Gramatiko de Esp.	4,75	3,55		
Kalocsay: Hung. Antologio	7,00	3,95		
Bleier-Kökény-Sirjaev: Enciklopedio de Esp.				
vol. I-II, ilustrita	17,00	10,25		
neilustrita en unu vol.	10,00	6,10		
Asch-Lejzerowicz: La sorĉistino el Kastilio	2,50	1,35		
Grenkamp-Brzekowski: Pri l'Moderna Arto	4,50	1,00		
Forge: Mr. Tot aĉetas mil okulojn	2,85	1,60		
Subtenu La Junularlaboron, mendu viajn librojn ĉe la redakcio de „La Juna Vivo”!			INSIGNOJ:	
			1. Simpla, verda stelo (0,20 gld.);	
			2. Stelo sur blanka fono (malgranda: 0,20 gld. — granda 0,25 gld.);	
			3. Ĉirkaŭ la verda stelo estas blanka rando (bela, granda: 0,30 gld.);	
			4. Granda stelo kun vorto „Esperanto” (0,30 gld.);	
			5. Stelo sur ora fono kun nigra rando kun vortoj „Esperanto Internacia Lingvo” (belega, bonkvalita: 0,30 gld.); — La insignoj estas livreblaj kun pinglo, broĉo aŭ butono. — Ĉe la mendo oni indiku la deziratan. — Aldonu por sendkosto 0,05 gld.	
			Glumarkoj:	
			„ESPERANTO KORESPONDATA”	
			1200 glumarkoj por hgld 0.80 + 10 % sendkostoj H. E. O. — Soesterberg, Holando — Poŝtkonto 88015.	